



# Kulturaj Kajeroj

TRIMONATA INFORMADA KAJ KULTURA REVUO  
REVUE TRIMESTRIELLE DE CULTURE ET D'INFORMATION

Direktoro : P. BABIN, prezidanto de la Kulturdomo de Franclandaj Esperantistoj, 44000 NANTES, Francujo

**JARABONO**

Jarabono : 65 fkoj

**P. BABIN**

13, boulevard de la Chauvinière  
44300 Nantes

P.C.K. Nantes : 2.813.61 L

(Vidu la liston de niaj perantoj sur paĝo 4)

**1987 - 2**

(APRIL-MAJO-JUNIO)

# EN TIU ĈI NUMERO

vi povos legi pri...



... Le Lude ...



Kaj IKONOJ (2-a parto)

# KULTURAJ KAJEROJ

## Trimonata informada kaj kultura revuo

### REDAKCIA KOMITATO :

#### Sekretario :

Jeannine Vincent, B.P. 54, 49150 Baugé.

#### Komitatoj :

Pierre Babin

Simone Guillot

### ENHAVO

	paĝo
Pri Grésillon	1
Esperanto tra la Mondo (Frangeul)	2
Le Lude - Spektintino	3
De kie venas "mono"? B. Golden	4
Paul Cezanne L. B.	5
Ikonoj (2) S. Boniol	6-7
La ŝippereulo F. Clary	8-9
Paĝo de la geknaboj Eva	10
Poemoj de J. Prévert- trad.J.Petrin	11
Por via distro C. Cavalié	12
La vie de Gresillon	13-14

## El Grésillon

Ĉiujare vizitas la kulturdomon gesamideanoj el la plej diversaj landoj. En 1987 kvindek lando estos reprezentita: Haitio. Ĉu ekzistas multaj lokoj, krom verŝajne kelkaj kongresurboj, kiuj rajtas fieri pro tia rekordo? El kvindek diversaj landoj venis al Gresillon homoj, kiuj sciis, ke ili trovos tie oportunecon lerni kaj praktiki la internacian lingvon. Multaj el ili venis timeme, kvazaŭ sur la piedpintoj, ĉar ili ne konis la esperantan popolon kaj ne sufiĉe esperanton. Post la unua sperto ili revenis kaj plustudis. Ili ofte revenas aŭ ni renkontas ilin denove. Tiuj, kiuj, post partopreno en Grezizonaj studperiodoj, rezignis ne multas, ĉar ili samtempe eklernis la lingvon

kaj praktike ekkonis ĝian uzadon. Ili rapide spertis, kiom riĉiga estas la vivo kun malsamlandanoj. Pro tio, kiuj eklernas la internacian lingvon en internacia etoso, tiuj daŭre restas esperantistoj kaj ankoraŭ pli konkrete, pli konvinke informas la ne-esperantistojn pri la viva realaĵo Esperanto.



KIAL RISKI KOLTORDIĜON ?  
PREFERE ABONU LA REVUON !

# Esperanto tra la Mondo

## GRANDSKALA MODERNA INFORMADO -

Okaze de la jubileo de esperanto, la belgaj esperantistoj sukcesis aperigi multajn informojn kaj longajn artikolojn en gravaj belgaj ĵurnaloj. Ankaŭ okazis elsendoj en radio kaj televido. Post tio, Flandra Esperanto-Ligo ricevis tiom da alvokoj, ke ĝi sendis milojn da informiloj... kaj eĉ ricevis gratulan leteron de la ministro pri Edukado.

Jen instiga ekzemplo de la nun farenda informado en nia moderna mondo. La propagando je eta kaj loka skalo ne plu sufiĉas!

## IOM POST IOM LA MOVADO KONSTRUIĜAS

EN AFRIKO - Fondiĝis Esperanto-klubo en Lome, ĉefurbo de Togolando, adreso: Esperanto-klubo "Nova Sento", B.P. 13 169 Lome, Togo. Oni antaŭvidas kreadon de nacia organizaĵo kaj oni havas dekjaran planon por fondi Esperanto-Kulturdomon.

## SE VI FREKVENTAS KAMPADEJOJN -

Por renkontiĝo de esperantistoj en kampadejoj por samtempe utile agadi por esperanto, skribu al Pieter van Duijne, postbus 265, NL-4330 AG Middelburg, Nederlando.

## FILMOJ EN ESPERANTO PRI EŬROPO -

Por prunte ricevi senpage filmon en esperanto pri Eŭropo, kaj eventuale aĉeti ĝin, turnu vin, en unu el la naŭ oficialaj lingvoj de la Eŭropa Komunumo, al: Commission des Communautés Européennes, Division audiovisuelle, Médiathèque, B 1/118 B-1049 Bruxelles.

GEMELIGITAJ URBOJ - Pri kontaktoj, renkontiĝoj de esperantistoj el ĝemeligitaj urboj, estus tre utile sendi mallongan raporton, kun se eble resumon en la angla aŭ la franca al: Cités Unies, 2, rue de Logelbach, F- 75017 Paris.

ESPERANTO-HOTELO EN BRITIO - Adreso de tiu nova renkontiĝejo: M. Davies, Esperanto-Hotel, 2, Oxcliffe Road, Haysham, Morecambe, LA3 1PS, Britio.

LA JUBILEO EN HUNGARIO - La centjariĝo de esperanto estis inde festita en Hungario. Okazis gazetara konferenco

dum kiu parolis D-ro Vilmos Saghy, emerita ministro, prezidanto de Hungara Esperanto-Asocio. Du semajnojn poste la inaŭguro de la nacia kongreso de esperanto okazis en la Parlamentejo. Ĉeestis eminentaj reprezentantoj de la hungara politika kaj kultura vivo. D-ro Lazlo Deme, renoma lingvisto prezidis. Samperiode komenciĝis la 5-a Internacia Renkontiĝo de Esperanto-Teatroj.

## SOMERFINAJ KAJ AŬTUNAJ OKAZAĴOJ

En la nova studrestadejo esperanta "La Kvinpetalo", route de Civaux, F-86410 Bouresse, Francio : 11-16 de septembro, stud-, ripoz-, turismstaĝo

Piedira migrado tra la montaro Ĵuraso, 19-21 de septembro: Kultura Centro Esperantista, Pf. 771, CH-2301 La Chaux de Fonds.

5-a Pariza Festivalo de Teatro kaj Kanzono, Parizo, 17-18 de oktobro: UFE, 4 bis, rue de la Cerisaie, F-75004 Paris.

Internacia simpozio pri esperantologio kaj interlingvistiko, 4-10 de oktobro, en la Internacia Feriejo de Pisanica (Bulgario). IUEF/V. Oljanov, pk 66, kv. E.Markov, BG 1404 Sofio.

## NOVAJ ELDONAĴOJ-

- "En barko senpilota", poeta verkaro de William Auld.

- "Obsedita de l'suno", hungara romano de Istvan Gall tradukita de Vilmos Benczik pri militaj kaj postmilitaj eventoj en Hungario.

- "La granda Meaulnes", la fama verko de la franca verkisto Alain Fournier. Perfekta traduko de Roger Bernard.

- Atendita reeldono de "Hura!", klasika romano de Julio Baghy.

- "Asterix, la granda fosaĵo", dua esperantlingva traduko en la fama serio.

- "Serĉu mian sonĝon" nova romano originala de Istvan Nemere.

- "Vetero kaj klimato de la mondo" de Denis Riley kaj Lewis Spolton, eldonita de la universitato de Kembriĝo, traduko de Kris Long.

# LE LUDE

---

Inter la gloraj kasteloj de Loire-valo (la tiel nomita lulilo aŭ ĝardeno de Francujo), Le Lude longdaŭre restis nekonata de multaj ĉar lokita tro nord-okcidente de la fama reĝa vojo. Fakte, en la pasinteco, la nobel-civito Le Lude estis kvazaŭ pordo inter la tri provincoj: Anjou, Touraine, Maine kaj nun ĝi restas sufiĉe proksime de Gresillon, en centro de angulo inter la ĉef-urboj: Angers, Tours, Le Mans.

Longe, dum mezepoko, militistoj batalis ĉi-tie, ankaŭ dum la longa Centjara Milito, kaj regis en Francujo granda mizero. Loré, Beaumanoir, Gilles de Retz reprenis la nobel-domon de la angloj. La franca reĝo Ludoviko la dekunua ankoraŭ konservis la fortikaĵon, sed, kvindek jarojn poste, sub regado de Francisko la unua, ekaperis tri ĉefverkoj de la franca arto: Chambord, Valençay, Le Lude. Tiu ĉi lasta, impona konstruaĵo sufiĉe masiva pro siaj dikaj turoj ĉe la anguloj estas do pura kreaĵo de la franca Renesanco, sed al la antaŭa gotika stilo la postaj jarcentoj aldonis novajn fasadojn, tiel verkante historion el ŝtonoj. Kaj la vasta parko, la flor-ĝardenoj, la teraso super la rivero Loir (ne Loire!) formas al ili majestatan kadron. Ĉu rigida kadro? Tute ne. Precipe de kiam, antaŭ pluraj jaroj, komenciĝis por la kastelo la pompaj noktoj, kiuj revivigas por pli kaj pli multnombra publiko la riĉajn horojn de la pasinteco. Se vi ŝatas belajn sonĝojn, poezion miksitajn kun moderna scienco, se interesas vin la evoluo de la kostumoj, de la har-aranĝoj kaj kap-vestoj, de la muziko, la danco, la arkitekturo, venu kun ni en Le Lude. Sur tia natura, ampleksa scenejo, kun subĉielaj dekoroj, tekstoj, sonoj, lumoj, brila prezentado perfekte harmoniigita naskos vian mirigadon.

Jen teknika aspekto de tiu spektaklo: por la magio de la lumo kaj de la akvo, centoj da projekciiloj, reflektiloj, lampoj regitaj de pluraj

lud-orgenoj ebligas multoblajn kombinaĵojn, ombrojn, lumajn nuancojn, surprizojn. Tiamaniere lumigataj multaj ŝprucofontanoj transformas la ĝardenojn, dum la rivero respegulas la kastelon kaj la sinsekvajn kolorajn movplenajn scenojn. Por tiuj eksterordinaraj teatraĵoj, multnombraj ĉevaloj, kolomboj, hundoj, ŝipoj, kaleŝoj, plej diversaj akcesoroj elspruĉantaj el la jarcentoj, sed antaŭ ĉio, centoj da amatoraj artistoj, loĝantoj de la urbeto, revivigas por ni la pompojn de la pasinteco.

Jen la festo donacita al sia edzino de Johano de Daillon, nobel-sinjoro de Le Lude, por celebri la naskiĝon de ilia filo. Je la sonorigado de la hobojoj kaj tamburoj la festo komenciĝas. Vidu belulojn kaj belulinojn el la Renesanco sin pretigi por danci gracion pavanon. Poste, Henriko la kvara haltas en Le Lude survoje de La Flèche al Chartres por ĉeesti la konsekradon. Kaj dum la regado de Ludoviko la dekkvara, la markizino de Sévigné, kiu de la akvo-kaleŝo elŝipiĝas ĉe Loir-bordo, en la parko de le Lude. Ve! Ĉi ne trovas la bonan amikon de Daillon. Ĉi skribas amleteron kiun ni aŭdos...sed ne trovos en la famkonata leter-kolektaro.

Kun nova posedanto de la kastelo, riĉegulo revenanta de Ĉinio, ĵus nobeligita de la reĝo, jen nova festo por celebri la freŝdatan akiradon. Jen nun la revolucio, kiu ne dispartigis la vilaĝanojn de ilia kastelano Frederiko de Talhouet, kiu partoprenis ĉiujn batalojn de Napoleono la unua. La generalo revuas la sinsekvajn regimentojn detale vestitajn. Gloro, dekadenco. Jen nova Imperiestro, Napoleono la tria. Lia ambasadoro kaj ties edzino, princino Troubetskoi alvenas en granda defilo. Gedancistoj donas agrablan spektaklon: rigardu la valsojn, admiru la robojn.

Lastaj festoj de la "bela epoko", ĉaskurado, kornsonoj, ĉevaloj, hundoj, cervo. La kastelo mallumiĝas kaj forirante la aktoroj adiaŭas per la manoj. Ĝis revido! ili diras.

Spektintino

# De kie venas «mono»?

La demando ne koncernas la materialon t.e. monerojn, bankbiletojn aŭ aliajn aĵojn, kiuj dum la historio de la homaro estis uzataj, kiel rimedoj por faciligi interŝanĝon de varoj kaj pagon por servoj. Temas tie ĉi pri la termino mem. La etimo de la Esperanta vorto "mono" povas esti aŭ la franca monnaie (elp. mone) aŭ la angla money (elp. moni). En aliaj eŭropaj lingvoj, samdevenaj vortoj tro diferencas de la Esperanta ne nur laŭ formo sed ankaŭ laŭ signifo. La latina moneta, itala moneta, hispana moneda, portugala moeda, germana Münze, rusa moneta signifas "monero" kaj ne "mono", kiu estas tute alia vorto. Estas interese, ke en pra-Esperanto 2 (1881-1882) la vorto por "mono" estas "kuno", kiu devenas de la latina pecunia.

La angla lingvo ricevis la vorton money de la mezepoka franca monnaie, kiu siavice havas kiel etimon la latinan vorton moneta, signifantan "stampita mono" aŭ "monero". Sed tiu estas ĝia figura senco, pli malfrua signifo. Pli frue kaj fundamente ĝi estis la nomo de la monfarejo en Romo, kaj se ni aplikas nian scion de la latina lingvo por pli profunda analizo, ni trovas, ke moneta estas adjektivo uzata substantive, kiel kromnomo de la diino Juno. En ŝia templo, situanta en la fortikaĵo de la monteto Kapitolo en Romo, estis fondita la unua monfarejo de tiu urbo, do Juno Moneta fariĝis la personiĝo de mono kaj monfarejoj. Sur romiaj moneroj ekde la regado de Domiciano (81-96) la diino aperas, kiel virina figuro staranta apud amaso da moneroj, tenanta du atributojn en siaj manoj, la abundokornon kaj la pesilon.

La kromnomo Moneta venas de la verbo monere "admoni, atentigi, averti, memoriĝi", do Juno Moneta estas Juno la Avertanto, kies funkcio estis protekti la romian ŝtaton. La diino ricevis tiun kromnomon, ĉar okaze de iu tertremo, aŭdiĝis

el ŝia templo voĉo ordonanta, ke oni donu al ŝi, kiel favorigan oferaĵon, gravedan porkinon. La tradicio diras ankaŭ, ke kiam la romianoj batalis kun Piruso, ili demandis, kiel ili povus akiri monon en sia granda bezono kaj embaraso.. Venis la respondo, ke ili nur uzu siajn armilojn ĉiam juste, kaj tiam ili neniam havos mon-mankon. Ankoraŭ unu legendo provas klarigi, kiel Juno akiris la atributon "La Avertanto". Laŭ Plutarko la blekado de la sakralaj anseroj de Juno savis la fortikaĵon sur Kapitolo, kiam ĝi estis atakita de gaŭloj en 390 a.K. Tiuj birdoj komencis gaki, kiam ili ekvidis la malamikajn skoltojn, kaj tiel la defendantaj soldatoj estis avertitaj. Poste, en 344a.K. la unua romia monfarejo estis konstruita en la tiea templo de Juno kaj ŝia nomo Juno Moneta asociiĝis al la produkt-aĵoj de la monfarejo.

Ne nur la ĉi-supre cititaj vortoj estas spureblaj al moneta; kelkfoje la formo tre ŝanĝiĝas, kiel la germana Münze. La angla mint signifas "monfarejo", minter aŭ moneyer estas "monfaristo" kaj monetary estas adjektivo signifanta "mona, financa".

Kiu interesiĝas pri etimologiaj esploroj povas daŭrigi la spuradon de aliaj vortoj apartenantaj al la granda familio, kiu devenas de la latina vorto monere. En Esperanto tiaj vortoj estas "admoni", "monitoro", "montri", "demonstri", "monstro", "monstranco", monumento" kaj "menso". Aldoneblaj estas ankaŭ la germanaj vortoj mahnen "admoni" kaj Muster "modelo, ekzemplo", la itala mostra "ekspozicio", la angla muster "revuo, militista parado" ktp.

Bernard Golden

---

RESTAS NUR KELKAJ TAGOJ

al vi por pagi vian abonon 1987

Vi povos eviti al ni kroman laboron

PAGU TUJ

# Paul CÉZANNE

"Diligenta lernanto" de la kolegio Bourbon en Aix-en-Provence, Cézanne ricevis ĉiujn premiojn, kiujn lia amiko Emile Zola ne ricevis. Li estis feliĉa dum sia infanaĝo kaj, kiel liaj samaĝuloj, estis ŝercema. Li partoprenis en fanfaro kaj ĉefe ŝatis ekskursi sur la montetoj, sin bani en la rivero Arc, ebriigi per suno, ekzaltiigi per eblaj revoj, ĉar li jam deziris fariĝi pentristo, kiel Zola estis jam alvokita de verkemo. Cézanne ĉeestis kursojn sed lia patro estis "terura paĉjo". Post longa vegetado en ĉapelvendejo lia patro fariĝis bankisto. Ege ambicia li ne konsentis, ke lia filo fariĝu "ŝmiristo", ĉar li tute ne komprenis la pentro-arton. Fine, laŭ petego de Zola, kiu tiam loĝis en Parizo, li konsentis pri la iro de lia filo Parizon. Sed li donis al li nur monatan sumon 125 frankan, por ke "li ne estu tro malŝparema".

En tiuj jaroj de la dua Imperio, la arto-medio bolis. La "Salono" donis al la artistoj la solan okazon prezenti siajn pentraĵojn. Juĝantaro konsistanta el akademiaj pentristoj kaj oficialuloj, senkompate formetis la artaĵojn, kiuj ne obeis la regulojn laŭdatajn de la Instituto. En 1863, tiom multaj estis la formetitaĵoj, ke, laŭ iniciato de Napoleono la Tria, alia salono estis malfermita, la "Salono de la Rifuzitaĵoj". Manet estis jam tre konata ĉar tiu Salono estis multe vizitata de homamaso kelkfoje bruema. Al la tiel nomita "Manet-anaro" apartenis Degas, Claude Monet, Auguste Renoir, Pissaro. Sed Cézanne, kvankam li admiris Manet, staris ekster la "Manet-anaro". Ĉar kiu tion kredus? Tiu stamfema Cézanne estis fakte dubo-turmentita, ŝanĝiĝema, malkontenta pri si mem; li furiozeme pentris, sed ankaŭ furiozeme detruis siajn pentraĵojn; li ofte translokiĝis sed ĉie kreis similan malordon. Sed li ĉiam maskis sian timon per krudaj fanfaronadoj. La gazeto

"Artisto" diris, ke "li estas speco de frenezulo, kiu pentras sub influo de drinkula deliro" kaj prezentas "rubaĵojn" faritajn el "forskrapaĵoj de paletro unuaspekte metitaj sur malpuran tolon".

Ĉar Monet titolis marpentraĵon "Impreso", kronikisto alnomis la ekspoziciantojn "Impresistoj". La kamaradoj de Cézanne alprenis tiun nomon kaj en 1877 kreis la "Ekspozicion de la Impresistoj". Sed la publiko tute ne komprenis ilin kaj Cézanne lacegiĝis. Post la milito li loĝis en la valo de la rivero Oise kun Pissaro, kiu bone influis kaj instruis lin. Plie fine eniris lian vivon virino, Hortense Fiquet, kiu donis al li filon. Sed Hortense estis frivola kaj ne interesiĝis pri pentro-arto. Cézanne ne parolis pri tiu ligiĝo, pri tiu patriĝo al sia patro pli kaj pli furioza pro la skandalo estigita de lia filo. La monata sumo de li donita estis nun malaltigita kaj pli malfacila fariĝis la vivotenado.

(sekvo sur paĝo 7)



## Ikonoj (2)

DEKORACIO KAJ TRADICIO- Vermilj-onaj kaj oranĝkoloraj strekoj estis konstante uzataj por starigi la bazon de la pentraĵo. Poste la artisto ekŝmiris tiun kolorhavan ebenon per ceruzo, kies blanko iĝis iom verdeta sekve de longa preparado. Poste li pentris la vizaĝojn per malhelbruna farbo kaj desegnis la trajtojn per ruĝa okro helbrune substrekita. La ombroludado kaj morbideco de la pentraĵo venis el la unua farbotavolo.

Tiuepoke la ikonpentristoj estis nesciaj pri la ombroj laŭ la okcidenta vortosignifo. Sed la ikonartista klopodis naski similajn efektojn per uzo de "makuloj" aŭ "lumaj punktoj", ĝenerale el ceruza blanko. Tial rimarkindas, ke tiuj lumaj fokuso alprenis apartan gravecon. Tiujn eligitajn helaĵojn oni titolis "vivigaj makuloj" t.e. kiuj antaŭenĵetas heligan brilon tipe altiran. Fakte tiuj etaj disradiantaj surfacoj alprenis la formon de ege malgrandaj kurbaĵoj kaj alkroĉis la rigardon per intenca fascino estigante ĉe la homestaĵo enan koncentriĝon. Ni komprenas, ke tiuj "makuloj" estis, por la kredanto mergiĝinta en kontemplado, nur elemento intensive fiksota, kiu enirigis la estaĵon en hipnotan staton. Fine ĉiam laŭ la sama celo de la artisto, t.e. ekkapti, la drapaĵoj, per kiuj la diaj roluloj estis vestitaj, sin ornamis per gajaj kontrastaj nuancoj kelkloke substrekitaj de malhelaj linioj. La ikonfono estis finfine prilaborata de la pentristoj kaj la realigantoj estis plene liberaj reliefigi certagrade siajn rolulojn. La fonoj estis ofte oritaj sur tavolo el vinaruĝa apreturo. Oni nomis ilin "svet" (lumo), ĉar ili prezentis la ĉielan prilumadon. La fonoj estis foje damaskenitaj per miksaĵo el bronzo kaj oro, aŭ el arĝento.

Do tra harmonio formata de iu tutaĵo el punktoretaro, kurbaj, rektaj kaj vertikalaj linioj, ekrilatigita kun la pristudata kolor-elemento, el materialo en rilato kun la ekvi-

libra ritmo de la pentro-komponaĵo, ekaperas la transfigurita ikonomondo.

Bildo estas reĝolando kun signifoplenaj formoj kaj koloroj, kien la kredanto strebas penetri renkonte al la celrimedo, per kiu li kapablos elporti la surteran vivon. Por la afliktita homo la koncepto pri ombro de la konscia menso projekciita enhavas la kaŝajn kaj malfavorajn aspektojn, pro kiuj la premato de la origina timo sinkas en la nokton de mizerego. Tial, tiuj foratempaj homoj, kiuj travivis konflikton kun sia propra detrua mallumo kaj strebadis al liberiĝo, soifserĉadis energiojn en direkto al la revigliga iluminado de la ikonoj. La aparta eco de l'ikono - sinonimo de bildo - ebligas, ke la homestaĵo, pere de ĝi, rilatiĝu kun la nevenkebla komunikigema transfiguranta potenco de la elementoj kiuj vivadas ene de li, kaj reakiru tiujn de la promesitaj ĉielaj beataĵoj.

Hodiaŭ la ekzisto kaj naturo de la simbolaro en la ikonarto havas por ni psikologian sencon, kiu estas daŭrinta de la praaj konsciaj balbutoj ĝis la plej malsimplaj formoj. En la ikonarto, la aliigo de okulvidebla materio al sublimigita energio estas klarigata de la projekciado de preciza bildo kun sonĝa enhavo, en ĉies nekonscio kuŝanta, sed ofte malaktiva. Evidentas ke la ikonpentristo estis sufiĉe fortika - ĉar li sin dediĉis al asketa riĉiga vivo - por superi la ĉieregantamallumon kaj disŝprucigadi sur la ikonajn lumbrilaĵojn al la bonvolemuloj proponitajn. En la nuna tempo, por la nova kono koncerne nian propran enon, la mediteblecoj de la Antikvuloj nin metas fronte al la problemoj niaepokaj cele al vera instruo disvolviĝintan memon celanta.

Ni vidas, ke ikono estis por piema fervora ortodoksulo objekto por kontemplado kun efiko kaj ago kuracaj. La famaj "vivigaj makuloj" estis okazaj "celpunktoj" por tiu, kiu ilin intime perceptis - ia retiriĝo el la konscio.

NEVIDEBLAJ POTENCOJ- En la religia historio de Ruslando dum



la XVII-a jarcento ni trafas ekzemplon pri tiu memhipnoto kaj retiriĝo el konscio, fariĝinta defendrimedo por la individuo pere de la ikono-kontemplado. Helpate de tiu rimedo li kapablis forpeli la mizeregon, kiu lin ofte superregis. Fakte, se memori tiun malserenan epokon de la slava imperio, ni konstatas la ribeladon de miloj da ortodoksuloj pro malakcepto de la novaj dogmaj reformoj, kiuj ĵus suferigis la religion. Kaj ni observas, ke la "malnovaj kredantoj" - ĝis nun troveblaj en Sovet-Unio - molestataj kaj malliberigataj, ĉar ili ne konsentis per tri fingroj krucoŝigni kaj rifuzis agnoski la Santan Spiriton kiel trian personon de la nova dogmo truditan, ĉerpis en kontemplado de siaj ikonoj superhomajn fortojn. Tiuj defendantoj de la malnova kredo, persekutataj de la cara polico kunportis kun si dumfuĝe la sanktajn energiojn, proprajn de la ikonoj dotitaj de ŝirmodefendaj

nevideblaj potencoj. Kaj dum ili ekhaltis, kaŝitaj en kelkaj lokoj de la vilaĝoj malproksimaj, tiuj persekutatoj sukcesis mem pentri tiujn "bildojn", kiuj enblovis en ilin enan firmecon, ĉe kiu ĉiaspeca klopodo foriĝis.

Kaj konklude ni omaĝu la ikon-pentriston, kiu transdonante al la kredantoj ekstersensan percepton de ia transo, kie regas la lumo gloroplena, trejniĝis al drasta asketa vivo, leviĝante al la suproj de la spirita vivo, kie li estos fariĝinta ia kreanto de transfigurita materio.

El la franca gazeto "La Nekonata Mondo".

Verkita de: A.M. Lambert-Farage

Esperantigis: S. Boniol

\*\*\*\*\*

## Paul CÉZANNE

Cézanne revenis al Aix. Li estis 46-jara sed aspektis 10 jarojn pli maljuna. Subjugita de sia patro kaj poste de sia onklino, li denove foriris. Li reatingis Renoir, ĉe la Roche Guyon, postkurita de Hortense, kiu finfine povis edziniĝi kun li en 1886. Li fariĝis pli kaj pli silentema, kaj solecema. Lia patro mortis kaj Cézanne subite fariĝis riĉa. Sed liaj malsukcesoj malfierigis lin kaj li iĝis pli kaj pli ŝanĝiĝema. Tamen liaj pentraĵoj neniam montris tiel potencon impreson de ekvilibro. Oni komencis paroli pri li. Ekde tiu tempo la famo de Cézanne iom post iom disvastiĝos.

Kaj jen okazis la "skandala testamento Caillebotte"! En 1894 tiu pentristo kaj kolektanto, amiko de la Impresistoj, mortis herediginta al la ŝtato sian kolekton entenantan kvar pentraĵojn de Cézanne. Fortegaj estis la reagoj sed la testamentajo estis akceptita. Iu Ambroise Vollard, kiu ĵus mal-

fermis galerion kaj deziris disvastigi sian negocon kalkulis kaj atendis la taŭgan horon. Konsilita de Pissaro, Renoir kaj Degas, Vollard decidis la organizadon de ekspozicio de la pentraĵoj de Cézanne. Ĝi estis inaŭgurita en decembro 1895. Post kelkaj tagoj, la "tuta Parizo" konis Cézanne kaj pasie diskutis pri lia arto. Kelkaj diris, ke oni certe vidos liajn artaĵojn en Le Louvre; aliaj, ke li pentris sensencaĵojn. La gloro de Cézanne pligrandiĝos jaron post jaro. Sed la pentristo estis seniluziigita. Plie li malsaniĝis pro diabeto. Li restis en Aix. Vollard venis al li kaj kolektis ĉiujn liajn pentraĵojn dissemantajn en la regiono. Cézanne pli kaj pli pentris aŭskultante nur la laŭdojn. En 1904 la Salono dediĉis al li tutan ĉambron. Sed la 15-an de oktobro 1906 li daŭre pentris sub la pluvo, malsaniĝis kaj mortis la 22-an de oktobro., tute sola, kiel li vivis...!

L.B.

# Ŝippereulo

rekte el hieroglifoj

tradukis Francoise Clary

Eminenta Akompananto diras:  
" Cia koro estu kontenta, Princo!  
Jen ni alvenas al la lando. Oni  
ekprenis la maleon, frapis la paliset-  
fiksaĵon kaj ĵetis teren la antaŭan  
fiksŝnuregon. Oni dankopreĝas, oni  
laŭdas Dion. Ĉiu brakumas sian kamar-  
adon. Nia ŝipanaro revenas sendomaĝe,  
sen pereo pri nia trupo. Ni atingis  
la finon de la lando Uuat(°), kaj  
transpaŝis la insulon Senmut(°).

Jen do ni revenas pace. Al  
nia lando ni alvenas. Do aŭskultu  
min, Princo, ĉar mi ne troigas.  
Ci lavu cin, verŝu akvon sur ciajn  
fingrojn, por ke ci respondu, kiam  
oni sin turnos al ci. Ci parolu  
kun spirito-preteco al la reĝo.  
Ci respondu ne balbutante! La buŝo  
de la homo povas lin savi. Lia parolo  
povas fari, ke oni indulgu lin.  
Agu do laŭ via plaĉo! Paroli al  
ci estas lacige.

Mi do tuj rakontos al ci ion  
similan al tio, kio okazis al mi  
mem dum mi iris al la minoj de la  
Suvereno(°). Mi descendis la Tre  
Verdan(°) per ŝipo longa je 120  
ulnoj(°) kaj larĝa je 40 ulnoj kun  
120 maristoj el la elito de Egiptio.  
Kiam ili inspektis la ĉielon aŭ  
kiam ili inspektis la teron, ĉiam  
iliaj koroj estis pli bravaj ol  
tiu de la leono. Ili anoncis fulmo-  
tondron antaŭ ĝia alveno, kaj ŝtormon  
antaŭ ĝia apero.

Fulmotondro eksplodis dum ni  
estis sur la Tre Verda antaŭ ol  
ni atingis la teron. Tamen ni navigadis  
sed la fulmotondro plifortiĝis kaŭzante  
ondon altan je 8 ulnoj. Kaj la ŝipo  
pereis. El tiuj, kiuj troviĝis interne  
neniu restis. Ondo de la Tre Verda  
deponis min sur insulon. Mi pasigis  
tri tagojn sola kun mia koro, kiel  
kompano. Kuŝante inerta sub arba  
ŝirmejo mi ĉirkaŭpremis la ombron.  
Poste mi elstreĉis la gambojn esplor-  
ante por trovi ion ajn metotan en  
mian buŝon. Tie mi trovis figojn

traŭbojn, ĉiajn belegajn legomojn,  
sikomorfruktojn neenfenditajn kaj  
enfenditajn, kukumojn, kvazaŭ oni  
kultivus ilin. Tie ankaŭ troviĝis  
fiŝoj kaj birdoj. Estis nenio,  
kio ne troviĝis tie. Tiam mi satigis  
min kaj forĵetis la troaĵojn teren  
ĉar estis tro por miaj brakoj.  
Kiam mi fortranĉis fajrbastonon,  
tiam mi estigis fajron kaj faris  
bruloferon por la dioj.

Tiam mi aŭdis tondro-bruon.  
Mi supozis, ke temas pri ondo de  
la Tre Verda. La arboj krakis,  
la grundo tremis. Kiam mi malkovris  
mian vizaĝon, tiam mi ekvidis serpent-  
on venantan. Ĝi estis longa je  
30 ulnoj kaj ĝia barbo superis  
du ulnojn. Ĝia korpo estis plakita  
per oro(°) kaj ĝiaj brovoj estis  
el vera lazurŝtono. Ĝi antaŭeniris.  
Ĝi malfermis sian buŝon al mi dum  
mi estis sur mia ventro fronte  
al ĝi. Ĝi diris al mi: " Kiu alportis  
cin, kiu alportis cin? Kiu alportis  
cin, kompatindulo? Se ci prokrastas  
diri al mi, kiu alportis cin al  
tiu insulo mi sciigos al ci cindrigita,  
ke ci iĝos, kiel ne plu videbla  
ulo." Mi respondis: " Ci parolas  
al mi, sed mi ne komprenas tion.  
Mi ne plu konas min."

Tiam ĝi metis min en sian  
buŝon. Ĝi kunportis min al sia  
rifuĝejo kaj demetis min senskue.  
Mi estis do sana kaj savita. Nenio  
estis prenita de mi. Ĝi malfermis  
sian buŝon al mi, dum mi estis  
sur mia ventro fronte al ĝi. Ĝi  
diris al mi: " Kiu alportis cin,  
kiu alportis cin, kompatindulo?  
Kiu alportis cin al tiu insulo  
de la Tre Verda, kies du bordoj  
estas en la akvo?"

Nu, mi rakontis al ĝi tion  
kun miaj brakoj etenditaj al ĝi.  
Mi diris al ĝi: " Mi descendis al  
minoj kun misio de la Suvereno,  
per ŝipo longa je 120 ulnoj kaj  
larĝa je 40 ulnoj kaj kun 120 maristoj  
el elito de Egiptio. Kiam ili inspek-  
tis la ĉielon aŭ kiam ili inspektis  
la teron, tiam iliaj koroj estis  
pli bravaj al tiuj de la leonoj.  
Ili anoncis fulmotondron antaŭ  
ĝia alveno kaj ŝtormon antaŭ ĝia  
apero. Ĉiu el ili estis bravkora  
kaj pli fortbraka ol sia kamarado.

Neniu nekompetentulo inter ili. Stormo venis dum ni estis sur la Tre Verda kaj antaŭ ol ni atingis la teron. Ni navigadis. Sed ĝi plifortiĝis kaŭzante ondon je ok ulnoj. La ŝipo pereis. El tiuj, kiuj estis sur ĝi neniu restis, krom mi. Ci vidu; jen mi apud ci. Ondo de la Tre Verda kunportis min al tiu insulo."

Nu, la serpento diris al mi: "Ne timu, ne timu, kompatindulo! Cia vizaĝo ne paliĝu nun, kiam ci venis al mi. Ci vidu, ke dio permesis, ke ci vivu: ĝi alportis cin al tiu insulo de la "Ka". Estas nenio, kio ne troviĝas tie. Ĝi estas plena je ĉiaj bonaĵoj. Ci pasigos monaton post monato ĝis ci plenumos kvarmonatan ĉeeston sur tiu insulo. Tiam ŝipo venos el hejmlando kun maristoj en ĝi, kiujn ci konas. Ci iros al hejmlando kun ili, kaj ci mortos en cia urbo. Kiel tiu estas feliĉa, kiu rakontas, kion li travivis, kiam la suferoj forpasis! Mi do rakontos al ci similaĵon okazintan sur tiu insulo.

Mi estis ĉi-tie kun miaj gefratoj. Estis infanoj inter ili. Entute ni estis sepdek kvin serpentoj: miaj infanoj kaj miaj gefratoj. Mi ne mencias filineton elpetitan per preĝo. Jen stelo falis kaj ili ekflamiĝis pro ĝi. Tio okazis, kiam mi ne estis inter ili. Ili brulis kaj mi ne estis inter ili. Mi preskaŭ mortis pro ili, kiam mi trovis ilin, kiel amason da kadavroj. Se ci estas brava kaj regas cian koron, ci brakumos ciajn infanojn, kisos cian edzinon kaj vidos cian hejmon. Tio estas pli bona ol io ajn. Ci atingos la hejmlandon, kie ci vivis inter ciaj fratoj."

Do, kuŝanta sur mia ventro mi tuŝis la grundon antaŭ ĝi, kaj mi diris al ĝi: "Mi rakontos cian potencon al la Suvereno. Mi informos lin pri cia nobleco. Mi faros, ke oni alportu al ci laŭdanon, hekenu-oleon, "iudenebon", kesait-spicon kaj incenson de la temploj, per kiuj oni plezurigas ĉiun dion. Mi do rakontos tion, kio okazis al mi kaj kion mi vidis pri cia potenco. Oni dankos cin en la urbo en la ĉesto de la tutlandaj eminentuloj. Ni buĉoferos por ci virbovojn kiel oferon; por ci mi tordos

la kolojn de kortobirdoj. Mi faros, ke oni alportu al ci ŝipojn ŝarĝitajn per ĉiuj riĉaĵoj el Egiptio, kiel oni faru por dio, kiu amas la homojn en malproksima lando ne konata de la homoj."

Tiam la serpento ridis pri mi kaj pri tio, kion mi diris. Laŭ ĝi mi parolis senpripense. Ĝi diris al mi: "Ci ne estas riĉa je olibano kaj ĉiaj incensoj. Sed mi estas la Princo de Puntio(°) kaj al mi apartenas la olibano. Tiu hekenu-oleo, kiun ci intencas alporti, estas la ĉefa produkto de tiu insulo. Cetere okazos, kiam vi forlasos tiun insulon, ke neniam plu ci revidos ĝin turniĝontan en akvon."

Nu tiu ŝipo venis, kiel ĝi antaŭdiris. Mi iris kaj lokis min sur alta arbo kaj mi rekonis tiujn, kiuj estis sur ĝi. Mi anoncis tion al la serpento sed mi trovis ĝin jam scianta tion. Ĝi diris al mi: "Ci sanu, ci sanu, kompatindulo, al cia domo, por ke ci vidu ciajn infanojn. Ci igu mian nomon bona en cia urbo: jen tio, kion mi petas de ci". Mi metis min surventre kun la brakoj etenditaj al li. Ĝi donis al mi ŝarĝon da mirho, hekenu-oleo, kesait- kaj tiŝepesuspicoj, nigra kolirio, ĝiraf-vostoj, incenso, dentegoj el eburo, ĉashundoj, simioj, pavianoj kaj multvaloraj aĵoj. Mi metis min surventre por danki ĝin. Tiam ĝi diris al mi: "Ci atingos la hejmlandon post du monatoj." Mi descendis al la bordo apud la ŝipo. Mi alvokis la ŝipanaron. Mi dankis la Mastron de tiu insulo, kaj kiuj estis sur la ŝipo, tiuj faris same. Ni navigis norden al la rezidejo de la Suvereno, kie ni alvenis du monatojn poste. Mi transdonis al la Suvereno tiujn donacojn, kiujn mi alportis. Oni promociis min Akompananto kaj dotis min per servutuloj de li." Ci aŭskultu mian paroladon, ĉar aŭskulti estas profite al la homoj." Sed li diris al mi: "Ne agu kiel pedanto. Kiu ektagiĝe donus akvon al kortobirdo buĉota matene?"

Estas finite, laŭ kio estis trovita skriba en la manuskripto de la skribisto lertfingra Amenemo, filo de Ameni; li vivu kaj prosperu!

# Paĝo de la Geknaboj



(Eva estas sep-jaraĝa esperantistino. Ŝi ŝatas lerni kaj ludi kun junaj geesperantistoj. Tial ŝi partoprenis en la paska infan-renkontiĝo en Gresillon. Jen kio okazis al ŝi ĉi-jare.)

Estas la dua jaro, ke mi ferias en la kastelo Grezijono. Mi tuj retrovis la balancilojn kaj mian malgrandan banejon. Tiun jaron mi lernas kalkuli kun "Mariŝa" kaj en la kastelo oni povas aĉeti bildkartojn "Kisu min". Sed mi ne povas manĝi mian tre bonan manĝaĵon tiun jaron. Domaĝe! Sed mi revenos.

EVA

en la kulereto, kiun mi havis en la buŝo? Kaj mi gajnis! Sed mia patrino ne estas sufiĉe inteligenta en la ludo "por iri al Ameriko". Por ŝi estas granda afero ne erari. Eĉ en la urbeto Baugé ŝi eraras pri la vojo. Imagu se ŝi kapablus trovi la vojon por iri al Ameriko! Si preferas butikumi:


Mi iris al Parizo  
por butikumi.  
Kaj kion vi aĉetis?  
Mi aĉetis ventumilon...

Nun mi ne povas daŭrigi mian skribadon ĉar mia patrino lernas "Kiel...tiel". Do, mi silentas.


EVA

Kio estas Esperanto?  
Esperanto estas lingvo. Sed per ĝi oni povas ankaŭ ludi kaj agrable ludi. Ĉu vi memoras la pilketon

## Ni DANCIS.



## Ni PARTOPRENIS LA



## KURSOJN

## Ni LUDIS EN LA ĜARDENO



## Ni IRIS EN LA DOLMENON



David

# POEMOJ

de Jacques Prévert

Tradukis: Jozefo Petrin

## POR FARI PORTRON DE BIRDO

Pentru unue kaĝon  
kun malfermita pord'  
pentru poste  
ion delikatan  
ion simplan  
ion belan  
ion utilan  
por la bird'

lokigu poste la pentraĵon  
sur iu arb'  
en iu ĝarden'  
en iu arbar'  
aŭ en iu arbej';  
kaŝu vin malantaŭ la arb'  
sen diri ion  
sen moviĝi.

Kiam la bird' alvenas,  
se ĝi alvenas,  
gardu plejan silenton  
atendu, ke en la kaĝon  
eniru la bird'  
kaj kiam ĝi eniris,  
fermu malforte la pordon  
per la penik'  
poste  
forstreku unu post la alia  
ĉiujn stangetojn  
zorgante, ke forfalu  
neniu birdplum'.

Faru poste la portreton  
de l'arb'  
elektante la plej belan  
de ĝiaj branĉoj  
por la bird';  
pentru ankaŭ la verdan foliaron  
kaj la freŝecon de l' verdaĵ'  
la polvon de l' sun'  
kaj la bruon de l' bestoj  
de l'herbaro  
dum la somera varm'  
kaj poste atendu, ke la bird'  
decidiĝu kanti.

Se la bird' ne kantas,  
tio estas signo malbona,  
signo, ke la pentraĵ'  
estas malbona;  
Sed se ĝi kantas, tio  
estas signo bona,  
signo, ke vi povas  
subskribi.

Tiam vi eltiru  
tre malrapide  
plumon de l' bird'  
kaj vi surskribu vian  
nomon sur iu  
angul' de l'  
pentraĵ'.

## LA FLUO DE L' VIVO

En dek du kasteloj, akiraĵ'  
Kontraŭ dek du plenbuŝoj da pan'  
Dek du homoj singultas pro malam'  
En dek du ĉambroj por ban'.  
Alvenis al ili malbona depeŝ'  
Malbona sciig' el malbona land':  
Tie, unu indiĝen'  
Staranta en sia rizej'  
Ĵetis al la ĉiel'  
Per insultomoka gest'  
Plenpugnon da riz'.

## LA KANTETOJ PLEJ MALLONGAJ...

La birdon, kiu kantas en mia kap'  
kaj ripetas al mi, ke mi amas vin  
kaj ripetas al mi, ke vi amas min  
La birdon kun tia teda refren'  
mi mortigos margaŭ dum maten'.

## LA SAĜO DE LA NACIOJ

Minerva ploras,  
Ŝia saĝdento elkreskas  
kaj la milit' senĉese rekomencas.

SOLVO DE LA ANTAŬA ENIGMO

# POR VIA DISTRO

horizontale-1-tunelo; 2-kopeko;9-elfo;  
10-tri; 12-akra; 13-trono, 16-gruo;  
17-turo; 23-oferi; 25-rumo; 26-sudo;  
27-tineo; 28-olimpio; 29-oriole.  
vertikale-1-tapeto; 2-nimfo; 3-Leo;  
5-oro; 6-ezoko; 7-okzalo; 8-mar0;10-tro  
11-ino; 14-nun; 15-tuj; 18-haremo;  
19-Afriko; 20-ardezo; 21-Georgo;  
22-amuzi; 24-lundo;

NOVA ENIGMO

lingva scienco	senstema fiŝo	seniluzingo	fiŝ'	reĝ' de Tebo	unu el tri
kompilaĵo	simio	dum plurraj tagoj	konjunktio	planto el boragaĵoj	izatido
narajit'					
malpreceje			rebonig'		
			afekci'		
balenoptero					metalo
prepozicio					laŭtipa
	rilata al aŭ birdo			japana dramo	
	antaŭnomo			similulo	
adverbo		memorigilo			persona pronomo
kolorkaĵon		apliki koloron li kvazaŭ			
				neprokrasteble	
				ses en Romo	
boundina			ovellasi		
karvokni'			tenuĝo		noto
			trui barelon de iĝi per movoj		malofra metal'
rilata al aŭ metalo				pintark'	
ĝi estigas kalucinojn				traktadon	
foŝis, ĉe Zamenhof					glob'
mi kaj ri					acido en la ceto-plasma
	post sepe				
	verba finaĵo			maljustaĵo	
malmodermineralon					
konsekutoblato					literumante: profito, utilo
				ĝtato regno	

# LA VIE DE GRÉSILLON

Forpasis André RIBOT

Afliktis nin la informo, ke André Ribot forpasis la 11-an de aprilo. Kiu ne konis lin almenaŭ laŭnome? Lia nomo vidiĝas sur multaj lerno- kaj inform-libroj nun bedaŭrinde grandparte elĉerpitaj. Li kuraĝis fondi eldonejon "Les Editions Françaises d'Esperanto". Tiu eldonejo aperigis la vortaron "Français-Esperanto" de Léger - Albault kaj reeldonis gravajn verkojn kaj tradukojn de L.L. Zamenhof: La Fundamento, Lingvaj Respondoj, Marta, Hamleto, ... Li multe prelegis pri Esperanto ĉefe en liceoj. Li gvidis kursojn ankaŭ en Grésillon dum multaj jaroj, kaj li estis vera amiko de la Kulturdomo. Pro tio ni malĝojege, profunde sentas lian forpason kaj tre sincere simpatias kun S-ino Ribot.

\*\*\*\*\*

Ĝenerala Kunveno 25-04-1987

S-ro F. Boyet kunven-prezidanto, donas la parolon al la prezidanto de la Kultur-Domo, kiu konstatas, ke 270 membroj de la Kooperativo ĉeestas aŭ estas reprezentataj por kapitalo de 84 800 f. La kunven-antaro rajtas interkonsiliĝi.

Koncerne la asocian kapitalon 19 akcioj estis ŝanĝitaj al donacoj, laŭ la deziro de la posedantoj. Sesdek novaj membroj aliĝis; la nuna asocia kapitalo sumas 165200f.

Demandoj estis faritaj koncerne la finanĉan raporton. La malaltiĝo de la restad-enspezoj estas la konsekvenco de la malpli granda nombro da diurnoj. Sed la vendado de la "kuponoj" altiĝis grandparte pro la kreado de la "butikoj" dekoraciita administrita kaj grandparte vivigita de Pascale Babin. La nutraj-elspezoj malaltiĝis; sed la prizorgaj elspezoj ampleksiĝis pro la maljuniĝo de la instalaĵoj kaj konstruaĵoj. La fakto, ke la enspezoj de la Libro-Servo altiĝis kvankam la elspezoj malaltiĝis praviĝas per tio ke libroj ricevitaj en novembro kaj tuj venditaj estas ofte pagitaj post du aŭ tri monatoj, ĉar nia konto en UEA estas parte "nutrita" per la aliĝkotizoj kaj antaŭpagoj de eksterlandaj aliĝantoj.

La kontoj estis aprobitaj de la kont-revizoroj kaj estas akceptitaj de la kunvenantaro.

La agadraporto montras, ke la nombro da diurnoj ne estis

tiom granda, kiom en 1985. Nur apenaŭ la kvarono de la staĝanoj restadis kompletan trisemajnan staĝon. Pro tio la kalendaro de 1987 estas iom modifita. La manlabor-kursoj suferis pro manko de gvidantoj.

La agadraporto estas akceptita.

Nur du demandoj eksterraportaj estis faritaj. S-ro Watier proponas planon por montri al la "ekstera mondo" la servojn, kiujn Esperanto povas proponi: organizadon de internaciaj fakaj renkontoj en Grésillon, eldonadon de dulinqvaj elektitaj paĝoj elkonataj francaj verkoj. Post diskutado la plimulto konsentas starigi komisionon, kiu studos la problemon.

Pri la laboro de la ĝardenisto, kiu promesis labori duontempe por la Domo, la respondo estas simpla: li malaperis fine de oktobro kaj reaperis nur tri tagojn antaŭ la printempa staĝo. Afero sekvena!

La diskutoj finiĝis je la 18-a horo.

La sekretario: G. Dairon



## KOMITAT-KUNVENO 26-04-87-

La kunveno komenciĝas je la 9.30 ah. Ĉeestas S-inoj Cheverry kaj Lenel; S-roj P. Babin, D. Babin, Fernand kaj Henry Boyet, Dairon, Lagrange, Métivier. Senkulpigis: S-ino Vincent, S-roj Benistant, Bodereau, Chevalier, Le Magadure.

La Printempa staĝo kunigis 40 personojn el kiuj 19 infanojn. Nur unu familio venis de alia lando. La staĝoj de 1987 prezentigis proksimume, kiel tiuj de 1986. Krom la programitaj staĝoj okazos, en majo, la jara kunveno de la Centr-okcidenta Federacio. La 14-an de junio kunvenos kaj tagmanĝos la membroj de la regiona sekcio de "Amitiés Franco-Chinoises". La 21-an de junio tagmanĝos 30 esperantistoj fervojistaj el LE MANS; de la 29-a de aŭgusto ĝis la 5-a de septembro okazos en Grésillon la post-kongreso de SAT.

Prelegos dum la unuaj du semajnoj de julio: S-ino Cheverry, kaj A. Childs-Mee; s-roj Boyet, Lloancy, Métivier, Röllinger kaj Roose; dum la Jubilea semajno: S-roj Duc-Goninaz, Janton kaj Lagrange. Dum la somero gvidos kursojn: A. Childs-Mee, J. Laporte, R. Lloancy, D. Moirand, L. Trenner-Gabrielli, J. Turbillon, J. Vincent, eble juna polo.

La Esperanto-Domo helpos en la organizado de la ekspozicio prezentota en la urbo de la Esp-Grupo de Baugé. La materialo venos grandparte de Angers. Jam staras en la parko de Grésillon memorŝtono kun indiko: "Esperanto centjara - 1987"

Krom al la kutime vizitataj lokoj oni planas ekskursojn al Monto Sankta-Mikaelo, Nantes kaj en la regiono, kie vivis kaj verkis Rabelais. Nia alvoko pri junaj helpantoj zorgontaj pri la infanoj dum la ĉeesto de la gepatroj en la kursoj ricevis nur unu respondon, de Dominique Baron. Tiu junulo restos je la dispo de la familioj.

Por la jaro 1988 jam alvenis proponoj: speciala semajno por preparado al la Atesto pri Kapableco, seminario pri metodo Cseh; semajnfina renkonto organizita de LF-Koop. Partoprenos en la somera programo Claude Piron.

Neatendita difektiĝo de unu el la hejto-kaldronoj devigis nin ŝanĝi la aparaton. Ankaŭ la elspezo (60 000 f.) estis neatendita !

La sumo necesa por la pago de la menditaj laboroj: refaro de la verando, anstataŭigo de kelkaj difektitaj fenestroj per novaj, ŝanĝo de la bariloj ĉirkaŭ la naĝejo, estas aparte metita. La tereno de la antaŭa fervojo, laŭlonge de la bieno estos aĉetita de la Kultur-Domo. Ni atendas la aĉet-certigilojn. La planita konstruo de aŭto-sunŝirmejo ne realiĝis, ĉar la speciala Fonduso enkasigis nur... 50 frankojn.

La sekretario: Guy Dairon

Lastminute: La 12-an de junio, neniu el la planitaj laboroj estis farita. Post viglaj riproĉoj al la entreprenistoj, parto el tiuj laboroj estos farita fine de junio.

## LIBRO - SERVO

Notre catalogue est à votre disposition. Nous vous le ferons parvenir contre un timbre-poste. Nous pouvons vous fournir tous les livres non épuisés et toutes les nouveautés.

Faites vos commandes sur lettre de préférence. Si vous êtes sûr du montant de la commande, joignez un chèque. Sinon attendez la facture qui sera jointe à l'envoi.

N'oubliez pas que les envois se font **franco au-dessus de 200 francs.**

Adressez vos commandes à : J. VINCENT, B.P. 54, 49150 Baugé.

Intitulé des chèques : Maison Culturelle Espérantiste.



# NIA KONKURSO



Kelkaj eraroj enŝoviĝis en la solvoj proponitaj en K.K. 87-1

## 2. A SERIO :

3) E. Privat estis prezidanto de UEA de 1924 ĝis 1928.

4) Anstataŭ « trifose » bonvolu legi « trifoje ».

## 3. A SERIO :

2) Oni povis respondi ankaŭ « V. Haŭy celis interrilatigi vidulojn kaj blindulojn ».

## 4. A SERIO :

3) Tria demando : oni povis kompletigi la respondon jene : « Ĝi estis tradukita de Fernando de Diego kaj eldonita en 1977 ».

## LISTO DE LA GAJNINTOJ :

- 1 — Restado en Grésillon (1 000 f.) :  
S-ro F. Boyet.
- 2 — Restado en Grésillon ( 500 f.) :  
F-ino M.-J. Berger.
- 3 — Libro-premio (200 f.) :  
S-ino J. Moirand.
- 4 — Libro-premio (100 f.) :  
F-ino J. Turbillon.
- 5 — Libro-premio ( 50 f.) :  
S-ino S. Humm.

Gratulojn al la gajnintoj... kaj al la aliaj, kiuj multe laboris.

## NOVAJ KONKURSOJ :

— Nova simila konkurso okazos en 1988. Pretigu viajn plumojn.

— Ĝis la fino de 1987, en numeroj 2, 3 kaj 4 de la revuo aperos konkursoj apartaj unu de la aliaj. Inter la gajnintoj estos dislotataj libropremioj en la valoro de 200, 100 kaj 50 francaj frankoj.



## KONKURSO K.K. 87-2

(problemo jam proponita en La Praktiko)

« Niaj amikoj Petro, Paŭlo kaj Johano estas egale bonaj kaj bravaj viroj, sed pri la laborrapideco ili rimarkinde diferencas. Jen konvinka pruvo :

Iun difinitan laboron Petro kaj Paŭlo kune povas fini en 12 tagoj. Sed Paŭlo kaj Johano kune laborante bezonus por la sama tasko 20 tagojn. Kaj, Petro kaj Johano kune povus fini tiun laboron en 15 tagoj.

Kiom da tempo bezonus ĉiu el la tri viroj se ili devus unuope fari la laboron ? »

La solvojn de la ĉinmera problemo vi rajtos sendi ĝis la fino de aŭgusto. Diligente laboru !



## Niaj perantoj

**Aŭstrio** : S-ro Johan Wieshofer, Wiener-Reichstrasse, 2, LINZ (220 aŭstr. ŝil.).

**Britujo** : S-ro K. Mac Lennan, 30 Lower King's Avenue — Exeter, EX 4 6 JT (7.00 pundoj).

**Danlando** : S-ro Ulrik Rasmussen, Norregardsvej 66, 2610, RODOVRE, Ĝiro 6.83.46 (80 kr.).

**Finnlando** : Libra Mendoservo Esperanta, kivistöntie, 05510 Hyvinkää 51 (60 mk).

**Germanujo Okc.** : S-ro Joseph Bode, 35 - KASSEL-OBERZWEHREN, Hinter der Brücke 22, pĉk. Frankfurt (M) 2347 59-601 (25 mk.).

**Hispanio** : S-ro Francisco Sanchez Anton, Avda Salamanca 10-10°-D 03003 ALICANTE - (1 300 pes.).

**Italio** : Itala Interlingvistika Centro, via Pantano 17, 20122 Milano - pĉk : 42 37 12 03 Literatura Foiro (180 n.l.).

**Japanio** : S-ro Tara Nišiumi, section Seiyoshi, ĉhuo-Universitato, 742 Higaŝi-Nakano, Hatiôzi-ŝi TOKYO-TO, J-192.03 (2500 jenoj).

**Jugoslavio** : Slovenia Esp. Ligo, Komenskega 7, LJUBJANA, poŝtfako 239 (12 U.S. dol.).

**Nederlando** : S-ro M. de Waard, Aurorastraat, 4, 5631 KK EINDHOVEN, pĉk. 209721 (24 gl.).

**Norvegujo** : S-ino Louise Bøe Marmarvn 2A Oslo 11 (60 kr.).

**Pollando** : Esperanto-Asocio, Jasna 6, VARSOVIO (12 us. dol.).

**Svedujo** : Sveda Esperanto-Federacio Brunnsgatan 21, S. 11138 Stockholm poŝtkonto : 20123 (65 kr.).

**Svislando** : Kultura Centro Esperantista poŝtfako 771. LA CHAUX-DE-FONDS - p.k. : 23-2921 La Chaux-de-Fonds (22 frs).

**Usono** : S-ro Bern Wheel, Books, 834 Weno nah, Oak Park IL 60 304 (12 us. dol.).



## KASTELO GRÉSILLON

BAUGÉ

Maine-et-Loire  
FRANCUJO

## ESPERANTISTA KULTURDOMO

De julio ĝis septembro ĉiulandajn esperantistojn kaj eventuale iajn ajn karavanojn frue anoncitajn

### Akceptas :

Por ripozi trankvile en atmosfero frateca ;  
Por eklerni aŭ plulerni la internacian lingvon ;  
Por ĝin praktiki per interŝanĝo de ideoj ;  
Por aŭdi kulturajn prelegojn ;  
Por studi specialajn problemojn ;  
Por inter amikoj gaje libertempoj ;  
Por ekskursi tra centr-okcidenta Francujo.

## venu al la Esperantista Kulturdomo

Kompleta Programo kun kondiĉoj havebla kontraŭ internacia respondkupono al :  
ESPERANTISTA KULTURDOMO, Grésillon, BAUGÉ (Maine-et-Loire) Francujo.